APERAS ĈIUTAGE

# Verda Voĉo de Doksy

REDAKTORO ANT. SLANINA

AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO-LERNEJO

Č. III – 1 Leden 1949

## LA TEMPO NENIAM HALTAS!

Transsaltinte limon inter 1948 kaj 1949 jaroj, mi devas pensi pri la lasta Somera Esperanto-lernejo ne Doksy, kiel pri pasintaĵo. Nun rememoroj nun ligas al tiu tempo, plena de ĉarmaj momentoj. Al tiuj antaŭtagmezaj horoj en lernejo, plenaj de entuziasmo, al tiuj belaj posttagmezoj sur strando de la Mácha-lago, al tiu bela kaj rava ĉirkaŭaĵo de Doksy, kaj al majestaj ruinoj de kastelo Bezděz ligas nin dolĉaj rememoroj. Travivaĵo en Doksy ne estas malaperaĵoj, sed periodaĵoj, ĉiu-jare ripetiĝantaj. Ni ĝoju pri estonteco, pri de nova kunveno ĉi-jare en Doksy kun freŝa esperantista sento, kun sopiranta koro travivi dekkvar feliĉajn tagojn en rondo „familia“. Ĉarma regiono de Doksy, la bela Mácha-lago kaj bone preparitaj kursoj de Esperanto vin atendas. Kaj mi ne povas alie ol diri, kiel respondis tiu lernantino en kurso Bo je demando de la instruisto, ĉu Doksy oni povas konjugacii: „Jes, pasintjare mi doksis, nunjare mi doksas kaj venontjare mi doksos.

A.S.

### FLORA LUDANTO

**Dezerta strato**

Tiu mallarĝa, kurba strato
Aspektas vere tre dezerte
Grizegoj premas ĝin inerte
Kaj nur malofte ĉara rado.

Sur ĝiaj kalvaj ŝtonoj saltas
Fenestroj tie brilas blinde
Kaj homoj tien alveninte
ne restas tie kaj ne haltas

Tamen kelkiam (ĉu vi miras?)
Ĉarma knabino tien venas
(kaj kvazaŭ lumo post si iras)

Tiam la strato sur sin prenas
Gajan aspekton kaj ĝi spiras
Pli freŝe dum si trapromenas.

**Nigra kanto**

Estas nokt´mez. Vi en la Urbo solas
Kaj vagas tien, reen, kaj parolas
al la malheloj, kiuj vin strangolas

Lanternoj sutas straten siaj blankoj
la urb posedas du mil strangaj vangoj
kaj en mil lumoj brilajn lumolangojn

Kaj ien de ie avenuen fluas
fremdega melodio, kiu bruas
kaj vian koron nostalgie skuas

Estas noktmez. Vi en la Urbo solas.
Kaj vagas tien, reen, kaj parolas
al la malheloj, kiuj vin strangolas.

*(la recititaj poemoj estis premiitaj en la konkurso de „Floraj Ludoj“ 1948 en Doksy – rimarko de la redakcio.)*

**Dr. Aug. Pitlik: Jazykové odpovědi – Lingvaj respondoj**

Esperantským filologům a znalcům Esperanta často docházejí z řad esperantistů dotazy, jež týkají se jazykových problémů Esperanta. Otázky ty ukazují, že mnohým esperantistům již nestačí vědomosti, jichž nabyli v kurzech Esperanta pro začátečníky a pokročilé, popř. jež naučili se v běžných mluvnicích, jež většinou znázorňují Esperanto jako řeč velmi lehkou, otázky ty jeví snahy o prohloubení všeobecné znalosti Esperanta, jež má býti sice řečí jasnou a jednoduchou, nikoli však slovníkově, gramaticky a slohově tak chudou, aby se jím nedaly vyjádřit všechny myšlenky a city člověka, jako je možno jazykem živým.

Tomuto hladu po hlubším studiu Esperanta snaží se částečně vyhověti redakce esp. Časopisů, že uveřejňují opravené a poznámkami opatřené esp. překlady textů z národního jazyka popř. v jazykových koutcích a rubrikách zvaných „Lingvo" probírají těžší stránky esp. mluvnice. Není divu, že i autor Esperanta po uveřejnění své „úplné" učebnice o 38 stránkách roku 1887 a i po řadu let pozdějších byl zahrnován nesčetnými dotazy, jež zodpovídal sourkomými dopisy a nebo hromadně v časopisech „La esperantisto" (v letech 1889-1893), „La Revuo" (1906-1908), „Oficiala gazeto" (1911-1912), „Lingvo internacia" a jiných, při čemž po roce 1906, kdy zvolen byl na 2. Světovém esperantském kongrese v Ženevě „Jazykový výbor" vždy upozorňoval, že jeho „Respondoj" třeba považovati za názory a rady pouze soukromé, neboť prý jedině „Esperantská akademie" po hlasování svého „Jazykového výboru" má právo rohodovati ve sporných a nerozhodných jazykových otázkách. Všechny Zamenhofovy jazykové odpovědi byly později sebrány a vydány v roce 1905 Dro. L. L. Zamenhof, Lingvaj respondoj nákladem Esperantista centro librejo v Paříži. Spis o 94 stranách obsahuje 99 odpovědí na 118 otázek.99 odpovědí na 118 otázek.

Staří i noví esperantisté najdou v těchto „Lingvaj respondoj" metodicky rozdělených na části o hláskosloví, kmenosloví, tvarosloví, skladbě a slovníku, většinu i dnes žádaných vysvětlení a poznají v nich ducha Mistra, nevnucujícího se, milujícího jazykovou svobodu, podivuhodně jasného, prozíravého a snášenlivého.

„Lingvaj Respondoj" Dra Zamenhofa a jeho spisy „Fundamento de Esperanto" a „Fundamenta Krestomatio" jsou tři základní pilíře, na nichž pevně a jistě spočívá Esperanto!

LETNÍ KOLEJ ESPERANTA V DOKSECH (Somera kolegio de Esperanto en Doksy) – 16.-30.7.1948

Doksy u Máchova jezera, obklopeného množstvím přírodních krás, stanou se letos (již počtvrté) ŝormaždištěm těch, kdož přejí si rychle, snadno a rychle Esperantu se naučiti, popř. prožíti v přátelském esp. prostředí příjemno a poměrně levnou dovolenou.

Místní rada osvětová v D. uspořádá v rámci svého kulturně-propagačního programu za spolupráce místního esp. klubu a členů komitétu „III. Letní školy Esperanta" ve dnech 16.-30. Července t.r. řadu kursů (základní, pokračovací, konverzační, seminář literární a historický (a zvláštní „cvičný" kurs pro učitele esp. Cseh metodou, jakož i cyklus esp. přednášek z esperantologie o esperantismu, jež prosloví přední čsl. Jazykoví odborníci a pionýři. Mimo to opět bude uskutečněn (ve větším rozsahu) oblíbený kurs umění řečnického.

Účasdtníci ubytováni budou pouze v soukromí (v hotelíĉ umístěn bude nově se utvořivší okresní úřad. Počet žactva je omezen (nejvýše 20, přihlásiti se nutno nejpozději do 15. června).

Zdařilá uspořádání kurzů v minulých 3 letech jak po stránce učební, tak i společenské a spokojenost 392 absolventů dosavadních kursů jsou nejlepším doporučením letošní účasti v Doksech.

Také letos s kursy spojena bude řada společenských podniků j. esp. divadlo, akademie, letní karneval, benátská noc na jezeře a jeho plážích, závody v plování a veslování, tánorový oheň, celodenní autokarový výlet, výpravy na houby aj. Další informace najdete v příštích číslech V.V. a „Esperantisty". Letní kolej esperanta „Doksy" u Nj. Š. 453.

**Čsl i esp. i neesp. veřejnost!** Pro čtvrteční klubovní schůze stanoven program 10 min. esp. přednášek na dobu od 1.1. - 31.III.49. Klub zřídí čítárnu a knihovnu a počátkem února otevře nový kurs pro začátečníky.

**Julie Šupichová-65 let.** Zasloužilá sanideánka paní Julie Šupichová, odb. učitelka v.v. slavila 27. ledna t.r. své 65 narozeniny. K jubilantce se ještě vrátíme v příštím čísle V.V. Zatím přejeme jí mnoho zdraví a úspěchů do dalších let!

**Miloš Nývlt** a jeho sestřička Eva nechť přijmou naši upřímnou soustrast k úmrtí svého milovaného otce Miloše Nývlta.

**"Verda Stacio"** vysílá 7. února t.r. veselou, karnevalovou půlhodinku pod názvem "Masky". Napsal Ant. Slanina s použitím balad dra T. Pumpra a K. Píče. Nezapomeňte napsat o poslechu na adresu: "Verda stacio" Praha XII., Stalinova 12. (Vysílání o 23 hod. na vlně Praha II 269 m, Brno I na vlně 325 m. Ostrava 259 m, České Budějovice 219 m.)

**Umělecký večer v Praze.** Klub esperantistů v Praze uspořádal dne 15.XII.48. esp. umělecký večer, na kterém účinkovali umělci "Verda stacio": Karel Höger, Zdenka Švábíkova, Zdenka Procházková, Věra Jindřichova, Josef Bartoš, prof. Marie Knotková a tančila Eva Nývltová. Konferoval Antonín Slanina. Večer se velice vydařil.

**Film o LŠED 1948.** S-ano Jan Pávek, Brno, Nové sady 9. natočil pěkný, film o LŠED 1948. Pěkné jsou záběry o slavnostním zahájení školy vztyčením esp. vlajky na stožáru před městskou radnicí, slavnosti při přejmenování ulice Esperanto v Doksech a život na pláži Máchova jezera. Film je natočen na formátu 9 l/2 mm.

**Statistika III. Letní školy esp. v Doksech 1948**. Kursů účastnilo se 192 žáků. Počet ten byl úspěch proti roku 1947 (114 ž.) ar. 1946 (80 ž). Z nich bylo 113 mužů ar. 9 žen. Věk žactva pohyboval se mezi r. 10-67! Největší počet z nich byl 20-30 letých. Dle zaměstnání bylo úředníků 46, studentů 30, obchodníků a živnostníků 27, učitelů 18, dělníků 14, soukromníků 12, různých povolání 8, želez. úř. 8, ředitelů škol 5, inženýři 4, učni živn. 3, právníci 3, typografové 2, lékaři 2, spisovatelé 2, důstojník 1, kněz 1, herec 1. Z žáků kursu C a D podrobilo se s úspěchem zkoušce o znalosti esperanta 21, zkoušce o schopnosti vyučovati espu 10, před zkušební komisí EAČSR, jež zasedala v Doksech po ukončení kursů.

**Sentencoj**
"La utopio estas revo de hodiaŭ kaj la realeco de morgaŭ." (Frédéric Passy)

"Neniu povas sekvi la vokon de Vero kaj Amo, kiam timo regas lin. Kuraĝo devas esti la bazo de moralo, religio kaj vivo ." (Gandhi)

**Rido sanigas.**

PATRO, kio estas antaŭulo?"
"Antaŭlo? Nu, ekzemple, mi estas via antaŭulo."
"Vere? Kial do, homoj fanfaronas kun siaj antaŭuloj?"

Ne insultu spegulon, se via vizaĝo en ĝi ne plaĉas al vi.

"Kien vi rapidas?"
"Striki"!

**Redakcio.** Tento oběžník je zaslán všem žákům třech ročníků "Letní školy esperanta" v Doksech. Další oběžníky vyjdou podle potřeby, nejméně však čtyřikrát před zahájením kursů - a přinesou mimo časový úvodník, básně a články z esperantologie i novinky "Letní koleje esperanta" se týkající. Budou poslány těm, kdož přispějí darem na režii a poštovné těchto oběžníků. Použijte bianko-složenky a vyplňte, Spořitelna Doksy, šekový účet 66427 s poznámkou "Verda voĉo". Děkujeme!

**Narozeniny Dr. L. L. Zamenhofa**. 15. prosince r. 1948 byl by se dožil autor esperanta 89. let.

**Dr. Kamarýt 65 let**. Ph.Dr. Stanislav Kamarýt, gymnasijní ředitel v. v. člen Esperantské akademie a čestný člen Mezinár. esp. svazu UEA, I. místopředseda EAČSR a předseda jeho zkušební komise, redaktor čas. "Esperantista", esp. spisovatel, atd. narodil se 10 září r. 1885 v jihočes. Velešíně. Esperantistou je od r. 1900, od kteréžto doby účastnil se esperantského života a zastával řadu funkcí, na vedoucích místech čsl. esp. hnutí. R.1921 byl předsedou XIII. Světového esp. kongresu v Praze. Svou činností veřejnou a spisovatelskou patří k nejpřednějším československým a světovým esp. pionýrům, svými velkými znalostmi a zkušenostmi, svým přátelským chováním, ochotou a uznáním kýmkoli vykonané esper. práce přispěl a přispívá ke klidnému vývoji esper. hnutí ČSR a jeho rozkvetu. Sláva mu a mnoho zdraví do dalších let.

Pi

**XXXIV. Světový kongres esperantistů** koná se v lázeňském přímořském městě v Bournemouth na jižním pobřeží Anglie ve dnech 6-13.VIII 49.

**Kongres čsl. esperantistů** koná se, současně s valnou hromadou EAĈSR o svatodušních svátcích 4-6. VI. t.r. v Liberci.

**Lektoráty esperanta mají university:** Innsbruck, Krakov, Liverpool, Lodž, Kunchen, Szeget, techniky: München, Praha, Wien, vysoké školy zemědělské: Wageningen, Wien, vys. škola obchodní: Bratisslava, exportní akademie: Wien, vysoká škola Justuse Liebiga v Giessenu. Před válkou existovaly katedry esperanto, ještě na vys. školách těchto měst: Dublin, Geneve, Lisboa, Milano, Zagreb.

**Ústavu ČSR esperantem** vydal Instituto de Eeperanto-Servo v Praze II. Knížečka "Konstitucio de Ĉeĥoslovaka Respubliko" zajímavá je též tím, že obsahuje mnohá slova z oboru politic. národohosp. sociálního a jež esperantistům nebyla vždy běžná, popř. vůbec známa. IES, jenž vydává měsíčník "Esperanto-Servo" nedávno vydal čtyřstránkovou esp. publikaci "Vizitu Ĉeĥoslovakion", landon de naturaj belaĵoj, mineral- kaj sanigfontoj!"

**Spolupráce es. esperantistů s osvětovými radami**. "Osvětová práce" (týdeník pro osvět. pracovníky, vydávaný ministerstvem informací), ve svém č. II. z 11. ledna t.r. přináší na str. 14 zprávu, že ministerstvo informací uložilo krajským, okresním a místním osvětovým radám, aby vešly ve styk s orgány čs. esperantistů a zahájily účinnou spolupráci. Jako naléhavý úkol jeví se tu především zprostředkování styku a vzbuzení zájmu o esperanto mezi dělnictvem. O vysledcích spolupráce mají rady podáváti pravidelné zprávy odd. VII. 2 min. informací. - Samideáni, navažte okamžitě styky s osvětovými radami! O dosažených výsledcích nás (V.V.) informujte.

**Schůzka Doksánů v Praze**. U příležitosti pracovní schůze esperantistů a školení, pořádaných EAČSR a IES ve dnech 14.-18. XII. 48, setkalo se v Praze mnoho bývalých žáků "Letní školy espa" v D. Vzpomínalo se a loučilo se slovy "Na shledanou zase letos v Doksech!"

**"Květinové hry"(Floraj ludoj) LŠEB.** Soutěže r. 1948 účastnilo se 8 samideánů (znich 3 ženy) 14 pracemi . Z těch bylo 6 básní původních, 2 přeložené a 6 prací prosaických. Komitét na své schůzi 16. XII. 48 v Praze uznal a peněžně odměnil tyto práce: 4 původní básně K. Píče (Dezerta strato, Nur unu vorto, Pasko, Negra kanto), překlad prof. M. Lukáše básně Sv. Čecha "Vězeň na Bezdězi" (La malliberulo en Bezdĕz) a pros. práci M. Kleinbauerové "Mortintino, kiu reaperis". Odměněné práce budou uveřejněny ve V.V.D.

Informační služba Klubu esp. v Donksech vydala 31.XII. 48 svůj. 4. oběžník redigovaný jednatelem V. Špůrem. Většina obsahu zajímala by

(zbytek textu nemáme)


# *Esperantista*

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9 – Redaktas dr. Stan. Kamarýt


---

**Letní kolej esperanta v Doksech**

(Somera kolegio de Esperanto en Doksy)
16—30. VII. 1949
II. zpráva:
S kursy bude spojena řada společenských podniků pro odpoledne a večery, m. j. celodenní autokarový výlet do sever. Polabí. — Ubytování bude pouze v soukromí, Pomýšlí se i na společné ubytování těch, kdož o ně projeví zájem, a na stravování v závodní kuchyni. — Počet žactva je omezen na 200; přihlášky se přijímají jen do 15. VI. — Školné za 48 hod. kursu nebo seminář a návštěvu cyklu odb. přednášek, ubytovně a účast na společenských podnicích (vyjma jízdné autokarem) činí celkem 780 Kčs, (Ubytovaným ve společných noclehárnách vrátí se po příjezdu do Doks rozdíl ubytovacího poplatku.)

Přihlášky na adresu: Letní kolej esperanta v Doksech se současným zasláním uvedeného obnosu bianko-složenkou na šekový účet 66421 Spořitelny v Doksech (s poznámkou »L. kolej esperanta«) přijímají se již nyní. Pospěšte si s přihláškou vzhledem k zájmu, který se již projevuje. — Propagační prospekt vyjde 1. V.
Vyžádejte si jej!
(Další zprávy v příštích číslech.)

Letní kolej esperanta v Doksech
(Somera kolegio de Esperanto en Doksy)
16.—30. VII. 1949
III. zpráva;

L. K. E. D. uspořádá od 16.—30. července t, r. tyto
kursy a společenské podniky:

1. Kursy: A. základní (názornou Cseh-metodou); B. pokračovacíj C. konversační; D. seminář gramatický, literární a historický pro znalé espa. činovníky a kandidáty zkoušek; E. cvičný kurs pro učitele espa Cseh-metodou; F. esperantský kurs umění řečnického; G. cyklus esperant. přednášek z

esperantologie a esperantismu. — Vyučují a přednášejí: Dr Kamarýt, prof. Kožený, Dr Pitlík, řed. Severa, uč. Slanina, Šolc a Špůr, Dr Vaněk, uč. Vítek a j. O účasti v kursech obdrží žactvo osvědčení. Vyučování bude denně od 8,30—12,30 hod. ve školní budově.
2. Společenské podniky; Seznamovací večírek, divadlo, karneval, benátská noc na Máchově jezeře, táborový oheň, celodenní autokarový výlet; odpol: koupání, veslování a plavecké závody na jezeře, besedy, výlety (pěší, drahou a po jezeře) do blízkého okolí (Staré Splavy, Bezděz) a j. — Informace o školném, ubytování a stravování viz ve II. zprávě! Přihlášky zasílejte na adr. K. Šolc, uč. esp., Mladá Boleslav I, 41, kursovné s ubytovným plátěnkou pošt. spoř. na šek. účet 729.501 Okres, spořitelny a záložny v Doksech u Máchova jezera s poznámkou „L, K. Esp,“. — Vyžádejte si prospekt s přihláškou! Počet žactva omezen, přihlášky přijímají se jen do 20. června. (Další zprávy v příštích číslech.) L K E D.

**Doksy.** — Kurson por komenc. gvidis Vl. Severa kaj V. Špůr. Skríban fínekzamenon farís 18 kursanoj. Komune kun gesamideanoj el Mimoň kaj Bělá pod Bezdězem oni ĝuis belan kursfinan vesperon sur velŝipoj kaj boatoj sur la lago, Sekvís arnika kunsido en la lagborda restoracio, Pianludis instruístínio Přibylová. La programon riĉigis Pacas per rakontoj pri siaj aventuroj.

**Somera Kolegio de Esperanto en Doksy** la 16—30-an de Julio, okazinta tiun ĉi jaron jam la kvaran fojon, signifís pluan gradon en sia evoluo. Aliĝis 246 kursanoj, inter kiuj estas 2 svedoj (Abrahamson Wania, Johanson Inge), 1 nederlandanino (Jopie Hendriks), 1 bulgaro (Dimitrov Todor). La Kolegio salutis perletere similajn kursarojn, samtempe okazantajn en aliaj landoj kaj ricevis ankaŭ de ili salutleterojn. Estis esprimita propono, ke tiaj someraj kursaroj interŝanĝu reciproke instruantojn kaj studantojn. Ni kredu, ke tiujara ĉeesto de 4 fremdlandaj esperantistoj signifas komencon de tiu ĉi ebleco.

La studantoj estis instruataj en du kursoj komenculaj (Al, A2, klasestroj K, Šolc kaj A. Slanina), en kíuj oni instruis laŭ la Ĉe-metodo, du kursoj progresintaj (Bl, B2, klasestroj J, Vítek kaj Fr. Pytloun), kurso konversacía C (klasestro V. Špůr), seminario por kandidatoj de instruista ekzameno kaj esperantistaj funkciuloj D (klasestro J. Kožený), kurso por kandidatoj de kapableco por Ĉe-metoda instruado E (klasestro K. Šok). Krom la nomitaj klasestroj instruadis direktoro de la lernejo Dr Augustin Pitlík, Dr Stan. Kamarýt, Zdeněk Raška, Vl. Severa, Dr. Fr. Vaněk, sume 11 instruantoj.

Krom la nomitaj 7 kursoj prilingvaj okazis ankoraŭ kurso oratora, gvidata de Ant. Slanina, kaj ciklo de prelegoj el esperantologío kaj esperantismo, en kiu prelegis Adolf Malík: Esperanto sur nova vojo (18.), K. Píč: Pri esperantaj neologismoj (25.), Dr. Stan. Kamarýt: Esperanto-movado en niaj landoj (26., 27.), Dr Aug. Pitlík: Fonetiko de Esperanto (28.), Dr. E. Sahliger: Esperanto kiel lingvo, Esperanto kaj laboristaro (27., 28.). Tiu ciklo estis destinita por D- kaj C-kursanoj kaj por gastoj kaj estis tre bone vizitata.

Interkonatiga vespero okazis la 16-an de Julio en halo de Distrikta Nacia Komitato. S-o V. Špůr bonvenigis la studantojn, direktoro de Kolegio dro A, Pitlík prezentis la instruantojn. Dimanĉon je la 9-a horo estis hisita Esperanto-Flago dum ludado de la Esperanto-himno. Direktoro dro Pitlík ínaŭguris solene la Kolegion, kiun poste salutis en nomo de la Distrikta Nacia Komitato ĝia prezidanto V. Sedláček kaj en nomo de Loka Kleriga Konsilantaro lerneja direktoro V. Severa. Poste la klasestroj kontrolis ĉeestantajn studantojn en la klasejoj. Depost la lundo okazis regulaj lecionoj, ĉiutage je la 8—12 h,, en klasejoj de la meza lernejo. E-kursanoj aŭskultadis en A-kursoj kaj akceptadis instrukciojn en apartaj lecionoj posttagmeze. Ankaŭ lecionoj de la oratora kurso okazadis posttagmeze laŭbezone en la lernejo aŭ en la subĉiela teatro. La vizito de studantoj estis daŭre tre akurata, neĉeestoj estis maloftaj. Ankaŭ hejmaj taskoj estis prilaborataj konscience kaj díligente. Lastan tagon, sabaton, estis prezentitaj al la studantoj ekzamentestoj, kaj ili ricevis konfirmon pri vizítado de la Kolegio kun klasifika noto.

La manko de loĝejoj kaŭzis, ke relative multaj kursanoj loĝis en komunaj loĝejoj, sed ne

estis aŭditaj plendoj pri tio. Ankaŭ komuna nutrado en fabrikmanĝejo de firmao Delta kontentigis multajn kaj la direkcio de la firmao akceptu kamaradajn dankojn pro la komplezo, kiun ĝi faris al la Kolegio per ebligo de tiu aranĝo.

Distraj kaj klerigaj entreprenoj por posttagmezoj kaj vesperoj, organizataj de s-o Ant. Slanina, kontentigadis ĉiujn same pro elekto de la programo kiel pro nivelo de la prezentado. Banado en la lago logis ĉiam multajn precipe dum bona vetero, kiu estis tiun ĉi jaron favora al la kolegio. Verda flago sur la strando vokis samideanojn al amika kunesto. Mallarĝaj filmoj, inter ili tiuj pri pasintaj kursoj, estis projekciataj de A. Slanina en la Subĉiela teatro la 18-an, prelego de s-o J. V í t e k pri Laplando kun mallarĝaj filmoj, projekciataj de Slanina, okazis la 25-an, amikaj kunestoj kun improvizitaj programoj okazis la 19-an (je la 16-a h.) kaj la 20-an je la 20 h. en la gimnastikejo lerneja. Koncerto kun artisma programo en restoracío Zátiší la 26-an je la 20 h. kunvenigis ĉiujn kolegianojn kaj ili tre aplaŭdis la programon, en kiu kantis operkantistino Věra Borská, akompanata piane de E. Urbanová, muzikis prof. Št. Urban je koncerta gitaro, B. Malíková je piano, kaj la „Verda kvarteto" (Mír. Týrala, Ant. Sattek, Lad. Kafka, Dr Fr. Vaněk), dancis Eva Rašková, deklamis Miloš Nývlt, prof. J. Kožený, Dr Vaněk, J. Eisenreich kaj aliaj. Bivaka fajro okazis la 21-an, la programo daŭris ĝis noktomezo, oni multe ridis. En ĉiuj tiuj prezentadoj gvidis kaj anoncadis la programon Ant. Slanina, kiu scias altiri sur la scenejon ĉiun, pri kiu li supozas ian talenton aktoran aŭ prelegan, kaj li sukcesis mirinde. Ekskurson al kastelo Bezděz posttagmeze la 22-an partoprenis ankaŭ tre multaj, kaj la sekvintan dancadon en gastejo U Třešňáků ankaŭ. La ekskurso dimanĉa, la 24-an, en kvar aŭtobusoj, al Česká Lípa, Děčín, Hřensko, tra „Ĉeĥa Svisujo" al Pravčická brána ne estos baldaŭ forgesita. Ni enskribu tie ĉi gvidinton de tiu ĉi impona ekskurso s-on J. Vítek.

La Venecia nokto sur Mácha-lago la 27-an estis travivaĵo rava. Multaj boatoj, sur ĉiuj ekskluzive esperantistoj, ridantaj, vokantaj, lumantaj per lampionoj same kiel per sprito; la boatoj laŭ Slanina-komando ligiĝas kaj faras gigantan rondon, piroteknikaj fajraĵoj sur la bordo ŝprucas al firmamento, turniĝas, fajfas, bombas, disŝutas steletojn de ĉiuj koloroj sur la akvon kaj orkestro sur strando muzikas. Pli ol du horojn daŭras tiu danco de lumoj, poste la boatoj albordiĝas kaj sekvas dancado sur la bordo. Kaj ni finu per adiaŭa maska balo en restoracio Zátiší, la lastan vendredon. La muziko ludis, maskitaj gesamideanoj svarmis, la bona humoro de tiu ĉi entrepreno estas jam tradicia; ankaŭ la sento de venanta nostalgio.

Apartan alineon meritas koncerto de voĉa, orgena kaj korda muziko, aranĝita de dro Fr. Vaněk la 28-an de Julio en katolika preĝejo je la 20,30 horo kun sekva programo: Bortnanskij: Kol Slaven, korda kvarteto, Bach: Preludium, koncerta gitara solo. Je rememoro de Georgo Dimitrov, la grava slavo kaj amiko de Esperanto. — 1. Haendel: Largo; Giordano: Caro mio Ben - aldo, akompanata per orgeno kaj violono. 2. Haydn: Adagio; Mozart: Ave verum - korda kvarteto. 3. Dvořák: Bibliaj kantoj - aldo, akompanata per orgeno kaj violono, 4. Tarriga: La grimo - gitara solo. 5. Brahms: Lulkanto; Fibich: Poem - aldo, akompanata per orgeno kaj violono. 6. Schubert: Adagio; Beethoven: Largo - korda kvarteto. 7. Gounod: Ave Maria - aldo, akompanata per orgeno kaj violono. 8. Orgena fugo. — Kantis kaj muzikis anoj de la Esperanto-Asocio Věra Borská, operkantistino, aldo, Brno; profesoro Štěpán Urban, koncerta gitaro, Praha; Miroslav Týrala, I. violono, Ostrava; Ant. Sattek, II. violono, Příbor; Ladislav Kavka, alto, Bakov; Dr Frant. Vaněk, violoncello, Karlovy Vary. Orgenon ludis Lad. Kavka.

Duaj Floraj ludoj de SKED havis laŭ sciigo de direktoro Dro Pitlík dum la koncerto la 26-an jenan rezulton: En la konkurso partoprenis 4 personoj per 12 verkoj, el kiuj estis 11 versaĵoj kaj 1 prozafo, La komisiono decidis, ke la unuan premion ricevu K. Píč pro la poemoj „Kíel vi forveturas?", „Mi vin amas, Georgino", „Rendevuo", „Princino Lauro", duan premion M. Kleinbauerová pro poemo „Mia urbo" kaj trian premion Frant. Přecechtěl pro poemo „Porpaca preĝo". Kelkaj el la premiítaj poemoj estis deklamitaj dum la vespero de M. Nývlt kaj aperis en VVD.

Verda Voĉo de Doksy, redaktata de Ant. Slanina, ree aperadis ĉiutage kaj estis legata de ĉiuj kursanoj tre atente. Ĝi estas instrua kaj amuza samtempe. Ni legis plurajn bonajn spritaĵojn sur tiuj ĉiutagaj kvar ciklostilitaj paĝoj, ni legis sur ili ankaŭ síncerajn kaj impetajn alvokojn por senti sin

homarano. Ni enskribu tie ĉi vortojn de S. K. Neuman, citítajn de dro Vaněk: „Esti homo, tio sonas fiere!" Tiujara „dusemajnkolekto" fieras per ilustraĵoj. Ĉiu el la dek numeroj havas karikaturon de unu el la instruantoj fare de s-o prof. Fiala. La bildoj fariĝis tre popularaj, oni povis facile kompari ilin kun la originaloj kaj multaj trovis, ke la bildoj superas la vivulojn.

La humoro de la kursanaro estis eminenta kíel ĉiujare. Oni sin ŝatis kaj amis reciproke, kursanoj la instruantojn, instruantoj la kursanojn. Kaj ĉiuj promesadis adiaŭante je revido ripete.